

## & Literatura reviviĝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1120 paŝoj dum 13 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj feroa melodio kaj rekantaĵo kiel por Sagaca knabino . Klarigoj (\*): '8 Elparolu: Ĵan Kuto'. '12 Tombon de faraono Tutanĥamono malkovris en 1922 arĥeologo angla.>

### (#Melodio:

(# Brúsajøkils kvæði:

/do TiLa LaLa SooFaFa LaLa LaSo LaLa; do TiLa LaLa SooFaFa dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaaLaLa LaLa SoFa FaFa SoLa; LaaLaLa LaSo FaSo La; LaaLaLa LaLa doorere redo Ti La;)

)×38 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 ... /Kaj tiu ĉi Librejo, la "Centra laŭ difino, ;  
Fariĝas ĉiunokte sorĉregno de feino.

(×: **Reĝo li luktas kontraŭ ogroj klinge ; Estas la  
veloj ruĝa silk' ; Drakŝipo kuras, ludas remiloj  
inge.**)

'2 Dum tag' – mi tion scias, – en paco kaj silento ;  
Sub ŝirma polvtavolo de jam kvaron-jarcento .....

'3 Ripozas sur la bretoj, laŭlonge de l' kvar muroj,  
; Binditaj belaj libroj najbare kun broŝuroj .....

'4 Kaj sen reklama bruo, samkiel Esperanto, ;  
Atendas eblan venon de ebla aĉetanto... ..

#### ,& Dua:

'5 Noktmeza hor' sonor. Ankoraŭ ĝiaj vibroj ;  
Akorde kaj signale tremetas sur la libroj .....

'6 Kaj jam de ĉiuj partoj, de l' planko ĝis plafono, ;  
Tra ĉiuj librofakoj laŭtiĝas flustra tono, .....

'7 Kaj sorĉe enkorpiĝas klasike famaj nomoj ; Kaj  
are rondodancas la svarmo de fantomoj... ..

#### ,& Tria:

'8 *Sokrato* de Jean Couteaux\*, fumante sian pipon,  
; Timtremas, ĉar dumtage revidis li... Ksantipon!  
.....

'9 "Ne estis ŝi! – sed tamen portreto tre simila," ;  
Al li konsole diras *Barbiro de Sevilla*. .....

#### ,& Kvara:

'10 *Ifigenio* ĉasta kun *Halka* kaj *Karmeno* ;  
Babilas pri sukceso ĉe l' Kvara en Dresdeno. ....

#### ,& Kvina:

'11 La Prus'a *Faraono* kun ironia rido ; Pretendas,  
ke pli certe ol ŝtona piramido .....

'12 Eterna polvtavolo ĉi tie lin protektas, ; Ĉar, ke  
li tie kuŝas... la Angloj\* ne suspektas!!

.....

#### ,& Sesa:

'13 Sed jam responde tuis signife kun ekspiro ;  
*Makbeto*, krime reĝo el lando de Ŝekspiro (\*),.....

#### ,& Sepa:

'14 *Hamleto*, la heroo demajstra tragedio, ; Sidante  
tre komforte sur la *Krestomatio*, .....

'15 Por fine konatiĝi kun sia la aŭtoro ; Nun lernas  
*l'Anglan Lingvon* kaj eĉ *Sen Profesoro!* .....

#### ,& Oka:

'16 Sed ĵus aŭdiĝis voĉo el supraj bretetaĝoj... ; Ha  
vi, *Georgo Dandin!* – El netranĉitaj paĝoj .....

'17 De paliĝinta libro sopiraj vortoj sonas ; "Mi –  
kvankam kiel *Reĝo de l' Montoj* supre tronas, –

.....

'18 Nun sidas *Sub la Neĝo* de l' polvo lastetaĝa ;  
Kaj *En Malliberejo* – (libreto tridekpaĝa) .....

'19 Tutsola kun *Frenezo* – (du aktualaj dramoj).

#### ,& Naŭa:

Sopiras al *Misteroj de Amo* miaj flamoj .....

'20 Kaj lumas jam la *Verdaj Fajreroj* de l'  
printempo; Pretiĝu al *Eliro*, ankoraŭ estas tempo,

.....

'21 Kaj al *Vojaĝ' Interne de Mia ĉambro!* – Certe!"  
; Kaj tiel parolinte *Georg'* simiolerte .....

'22 Degrimpis de l' supraĵo kaj tra la *Proverbaro* ;  
Alvenis kun *Bukedo* ĉe *Virinet' de Maro*, .....

'23 Ŝi estis tiu *Marta*, ĉe kiu antaŭ longe ; Li gasto  
estis en la *Kastelo de Prelongo*; .....

'24 Krom danko li ankoraŭ al ŝi – pro prunedono  
– ; Ŝuldadis la *Sentencojn de l' Saĝa Salomono*.  
.....

'25 *Fatala Ŝuldo*, ho ve! (de sinjorino Cense)... ;  
"Ĉu li? – *La Avarulo!*" ŝi kriis kaj kompanse, .....

'26 Postforta *Vangofrapo*, (traduko de Ŝo Saro) ;  
Insultojn serĉis en la *Marista Terminaro*. .....

'27 ... *Batalo de La Vivo... Mistero de Doloro...* ;  
Sed li sin senkulpigis, almenaŭ pro l' honoro: .....

### **,& Deko:**

'28 "Mi havis *Travivaĵojn*" li diris "pli ol *Ro Ŝo!* ;  
Min kaptis la *Rabistoj* kaj ve, en mia poŝo .....

'29 Neniu mono restis, ne eĉ la... *Readmono!* ;  
Hontinde tratatita pli ol *Amfitriono* .....

'30 Sur *Fundo de l' Mizero* mi rampis tra mallumoj  
; Kaj vagis *Tra La Mondo...* (entute du volumoj!)  
.....

'31 En tiuj ĉi *Abismoj* vi estis balzamguto, ; Nur  
vi, *Mirinda Amo*, kaj... *Solo nur de Fluto!*" .....

### **,& Dek unua:**

'32 Tuŝite ŝi pardonis al sia koramanto ; Kaj  
harmonie sonis l' *Interrompita Kanto...* .....

### **,& Dek dua:**

'33 "*Kiel Ni Plibeligos la Vivon?*" diris Marta, ;  
"Ho venu nur," li flustris, "sur bretangul' aparta  
.....

'34 Ni kuŝos sur la *Laŭroj*, parolos pri... *Patreco* ;  
En ama ĉirkaŭpreno, en ĉarma feliĉeco! .....

'35 Ni bone amuziĝos, ĉar tie sur la breto ; De  
longaj jaroj restas leginda volumeto..." .....

### **,& Dek tria:**

'36 Kaj Marta kaj Georgo, (ĉu nur pro scivolemo?)  
; Okupis sin ververe pri tre scienca temo, .....

'37 Kun intereso, senbruaj ekkrioj, ; "*Pri Unu  
Speco de Kurbaj Linioj*"... .....

'38 Jen estas la titolo...

### **,& Dek kvara:**

Sed lumas jam l' aŭroro, – ; Silenton! – Baldaŭ  
venos, ĉu ne, *La Revizoro!* .....